



# LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

**Kosto de abono por jaro:** Skandinavaj kronoj 4,00 = hungaraj kronoj 5,50 = frankoj 5,75 = rubloj 2,00 = germanaj markoj 4,50 = portugalaĵaj rejsoj 1200 = brazilaj rejsoj 2500 = dolaroj 1,25 = ŝilingoj 4 1/2.

**Pago por anoncoj:** 15 oeroj = 20 heleroj = 20 centimoj = 8 kopekoj = 15 pfenigoj por duonpaĝa petitlinio. — 10% rabato por duonjara, 25% rabato por tutjara anoncado; ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redakcio: **Paul Nylén**, en la redakcio de »Vårt Land«, **Stockholm**, Sverige (Svedujo). — Adreso de l' administracio: **Paul de Lengyel**, en **Szegzárd**, Magyarorszáĝ (Hungarujo). — Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la **redaktoro**; pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la **administranto**.

## Al niaj legantoj.

Kun la espero ke niaj estimataj legantoj ne tro malaprobos tiun ĉi aranĝon, ni kunigas en tiu ĉi kajero tri monatajn numerojn por atingi per tia maniero la akuratecon en la elirado de l' gazeto.

Ni tamen ne atingis ĝin tuj per unu salto, sed ni jam proksimiĝas.

Tiu ĉi numero ampleksas 20 paĝojn.

\*

Ĉu eble vi pripensis, ke ju pli da kun-abonantoj vi havos, des pli grandan respekton kaj estimon havos la homoj por la gazeto kaj por — Esperanto?

Flegu la estimon por Esperanto en la mondo!

*La Redakcio.*



**Al tiuj estimataj esperantistoj**, kiuj havis la komplezon aboni pli ol unu ekzempleron de nia gazeto en la jaro 1900, ni sendis tiom samajn ekzemplerojn ankaŭ de tiu ĉi numero. Kiu eble nun ne dezirus reaboni denove tiom, li volu sciigi pri tio la administracion.

Sendu la monon al s-ro **Paul de Lengyel**, en **Szegzárd**, Hungarujo.

Tiuj inter niaj *rusaj* amikoj, al kiuj *estas neoportuna* sendi monon eksterlanden, povas sendi la abonon al nia estimata ĉefo **D-ro L. Zamenhof** en **Varsovio**, ul. **Dzika** N<sup>o</sup> 9.

En Francujo s-ro **René Lemaire**, sekretario de la Societo por la propagando de Esperanto, en **Epernay** (Marne), akceptas abonmonon ankaŭ por nia gazeto.

La administracio volonte sendas kelkajn ekzemplerojn de nia gazeto al tiuj, kiuj volas varbi novajn abonantojn.

Fine, ni petas niajn abonantojn ankoraŭ nepagintajn, ke ili volu havi la bonecon, ensendi kiel eble plej baldaŭ la abonmonon.

Skribu klare kaj legeble, kaj skribante manuskripton, ĉiam nur sur unu flanko de l' papero!

*La Administracio.*

## Respondo al la „Letero al la redakcio de L. I.“

de ankaŭ multjara abonanto.

Leginte kun granda intereso la leteron de abonantino multjara en la numero 10—11 de la L. I. 1900,\* mi opinias, ke estos kredeble interesa por la redakcio, kiel ankaŭ por la legantaro aŭdi alian opinion de ankaŭ multjara abonanto sur la priparolita temo.

Mi mem estas konvinkita, ke la linioj, el kiuj ellumas nur tro klare la »doloro kaj eĉ akra ĉagreno« de l' aŭtorino pri la malprogreso

\* Por ke ankaŭ niaj nove aliĝintaj abonantoj povu legi la diritan artikolon, ni jene represas ĝin:

### Letero al la redakcio de la »Lingvo Internacia«.

Estimata Sinjoro Redaktoro!

Mi petas Vin presi en plej proksima numero de L. I. tiun ĉi leteron de malnova fervora esperantisto.

Abonante nian gazeton dum 8 jaroj, mi ĉiam ricevas ĉiun novan kajeron kun plej viva gojo, bone sciante, ke ĝia enhavo estas freŝa kaj interesa; tiel estadis ĝis fino de 1898 jaro, kiu estis la lasta bona jaro por nia gazeto, ĉar post ĝi L. I. ja mortis. Vere, la gazeto denove aperigis nun, en tiu ĉi jaro, sed kun granda bedaŭro oni devas konstati, ke ĝi revivigis nur per sia nomo, — per nenio alia... Kaj nun, ricevante novan kajeron, mi ne sentas jam gojon, kiel en pasintaj jaroj, kontraŭe, mi sentas doloron kaj eĉ akran ĉagrenon, ĉar mi konvinkigis jam, ke ĉiu nova kajero de nia nuna gazeto estas pli kaj pli malinteresa.

Tiun ĉi malĝojan fakton oni povas klarigi per tio, ke dum antaŭaj jaroj la gazeton subtenadis per sia kunlaborado tiaj lumiloj de l' esperantista rondeto, kiel nia glora ĉefo d-ro *Zamenhof*, s-roj *Gernet*, *Kofman*, *Devjatnina*, *V. Langlet* kaj aliaj. Dume nun, en nova L. I. kunlaboras esperantistoj tute nekonataj, ĉe kiuj eĉ sub mikroskopo estas maleble trovi fajron da talento. Dum antaŭaj jaroj la abonantoj ricevadis la gazeton akurate, ili povis legi efektive seriozajn artikolojn, talente verkitaĵojn aŭ tradukitaĵojn kaj belegajn melodiantajn versaĵojn. Kaj nun ni ricevas aŭgustan kajeron nur en novembro kaj devas legi fabelojn pri tio, kiel elkreskis rostro ĉe elefantido, renkontadi preskaŭ sur ĉiu paĝo tiaj malpiaj perloj, kiel ekzemple »sen ke li povus« (kaj similaj »senkelicecoj«), aŭ rompadi sian kapon per solvo de tiaj malfacilaj rebusoj, kiujn tuj solvus eĉ kvinjara infaneto...

Kaj tia estas la enhavo de la sola presa organo de serioza homa rondeto, kiu celas tian grandan, belan ideon, kiel Esperanto kaj ĝia disvastigado!

Ne estas do mirinde, ke la nombro de abonantoj de l' nuna L. I. pli kaj pli malgrandiĝas, ĉar ekzistas tre malmultaj personoj, kiuj abonadus gazeton nur laŭ principo.

de la L. I., efektive estas skribitaj en la bona intenco plibonigi estantajn aŭ nur supozitajn mankojn de la gazeto, unuvorte en la intenco fari ion bonan! Sed bedaŭrinde la aŭtorino en ŝia estiminda fervoro iris tro malproksimen super la celo. Mi eĉ estas konvinkita, ke por tielaj akreskribitaj leteroj jam »per si« ne nur la nombro de la abonantoj ne estos pligrandigata, sed ankaŭ la redakcio mem certe

Ĵus mi ricevis la aŭgustan kajeron, en kiu s-ro Rakitski esprimas sian opinion, ke ni devas kiel eble plej multe *reklami* Esperanton. Kredeble s-ro R. forgesis, aŭ eĉ tute ne scias, ke d-ro Zamenhof ĉiam estis kontraŭ ia ajn reklamo pri Esperanto. Kaj d-ro Zamenhof estas tute prava, ĉar ĉiu saga honesta homo rilatas al reklamo kup tre komprenebla malestimeto, dume kredas al ĝi nur homoj malseriozaj aŭ dezirantaj reklami sin mem. Ŝajnas al mi, ke ni, veraj esperantistoj, ne devas tro avidi je akiro de tiuj ĉi lastaj personoj en nian rondeton.

Se la nombro de veraj esperantistoj estas ne tiom granda, kiel tio ĉi estus dezirate, — la kaŭzo dependas ne de tio, ke la homoj ne scias pri Esperanto, sed tial, ke ili postulas antaŭ ĉio pruvon de ĝia taŭgeco. Mi mem ofte aŭdis tian frazon: »se Esperanto estus efektive bona lingvo kaj utila, ĝi havus sian literaturon; ĉar sen literaturo lingvo ne estas lingvo.« Kaj kiam mi montradis al tiuj ĉi personoj nian antaŭan gazeton aŭ tradukon de »Hamleto«, »Kain«, »Demono«, »Iliado« kaj aliaj, — ili ne havis kion kontraŭdiri kaj tuj komencadis rilati al Esperanto multe pli estime. Kaj nun per kio ni povas respondi je similaj kontraŭdiroj de skeptikoj? Estas ja honte konfesi al fremdaj homoj, ke nia literaturo nun... regresas; kaj certe ne per la nuna L. I. ni povas pruvi kontraŭan, des pli, ke sendube baldaŭ L. I. tute ĉesos sian ekzistadon: ja ĝi progresu havas pli kaj pli malmulte da abonantoj, dume nenia gazeto povas ekzisti sen ili.

Tial, por ke havi eblecon vivi kaj plenumadi sian gravan antaŭdifinon, nia gazeto devas ne reklami sin, sed esti serioza, interesa kaj akurata je sia elirado. Pri akurateco devas zorgi la administranto de l' gazeto, dume ĝia plibonigo de enhavo estas atingebla nur en tia okazo, se la malnovaj kunlaborantoj, kiujn mi ĵus nomis, forjetos sian strangan malvarmigon (mi ne scias kiel supozu alie) al Esperanto kaj venos je helpo per siaj talentaj plumoj. Mi ne dubas, ke ili volos tiel agi, ĉar sen ilia helpo la gazeto mortos eble jam por ĉiam... Kaj ĉu ne mortos kun ĝi nia afero mem?... Oni devas pensi pri tiu ĉi minaca ebleco.

S. Petersburgo, 1/14. novembro 1900.

A. Prohoroviĉ-Koĉmarenko.

devus perdi la kuraĝon plue agadi por la bona afero, se la danko kaj estimo por la oferoj je tempo, laboro kaj mono esprimiĝos per tielaj leteroj, kiujn la redakcio eĉ estas devigata superflue mem presigi en la gazeto kaj kiuj esprimas riproĉon, kiu en neniu okazo estas meritita de la redakcio en tiel akra maniero!

Mi eĉ estimas, ke estas devo de la legantaro defendi la redakcion kontraŭ tielaj ofendoj, por ke ĝi vidu, ke la opinioj pri la priparolata temo estas diferencaj kaj ke tamen estas legantoj, kiuj volonte ŝatas sufiĉe la oferojn, kiujn portas la redakcio por nia bona afero.

Pro tiu ĉi kaŭzo estu permesita al mi trairi iom pli precize la leteron kaj respondi al la diversaj punktoj de la akra riproĉo.

Ankaŭ mi konas kaj posedas la gazetojn de la pli fruaj jaroj komencantajn de l' »Esperantisto« kaj finantajn per »l' Espérantiste« kaj L. I., tiel, ke ankaŭ mi eble havas ian rajton esprimi juĝon pri la progresado aŭ malprogresado de la gazetoj. Se la estiminda aŭtorino nun simple elmetas la konfirmon, ke 1898 efektive la L. I. mortis por ĉiam, mi povas ja kompreni ŝian doloron pri tiu ĉi fakto, sed mi ne povas konsenti tiun ĉi konfirmon kaj sekve ne povas konsenti la doloron de l' aŭtorino. Kontraŭe la L. I. malgraŭ ĉiuj multnombraj malhelpoj, kiuj kontraŭstaras al ĝi, donis al ni ĉiuj la pruvon, ke ĝi vivas kaj espereble vivos ankoraŭ longan tempon. Tion ĉi pravas al ni la lasta jam unujara eldono de la L. I. kaj prefere la lasta numero de la L. I., kiu plaĉas al mi en ĝia beletristika parto eksterordinare malgraŭ ĉiuj tiuj ĉi nekonataj aŭtoroj, al kiuj eble estas kalkulata ankaŭ mi, ĉar mi bedaŭrinde havis la malfeliĉon ankaŭ sendi mallongan tradukon por tiu numero. Mi certe ne devas diri, ke tiu ĉi lasta rimarko nur estas ŝerce dirita, ĉar mi esceptas mian personon de la tuta disputo kaj mia juĝo nur koncernas la aferon mem. Kiel dirite mi tute ne povas ekkoni tielan malprogreson je inte-

resa kaj spirita enhavo de la gazeto, sed ankoraŭ hodiaŭ mi legas kun tiel granda plezuro kaj ĝojo la gazeton en ĝia nuna vesto, kiel pli frue. Sed »*de gustibus non est disputandum*« — estas sence disputebla pri la demandoj de gusto — kaj mi konas ne sufiĉe la ĝuon de la estiminda aŭtorino, por ke mi povus kompreni la postulojn de ŝia ĝuo, tamen mi nur povas esperi kaj deziri pro la intereso kaj de la gazeto kaj de nia afero amata, ke la postuloj de la ĝuo de la ceteraj abonantoj estu malpli delikataj, ol tiuj de la estiminda aŭtorino.

Koncerne nun la opinioj pri la kunlaborantoj tute nekonataj de la L. I., kun kiuj la bedaŭrinda gazeto devas labori hodiaŭ, kontraŭe mi estas certigita, ke ni ĉiuj devus saluti ĝojege tiun ĉi fakton, ĉar ĝi estas pruvo al ni, ke ankaŭ aliaj samideanoj komprenis la gravecon de nia komuna organo kaj estis pretaj preni al si ankaŭ iun parton de la laboro de l' redakcio, entrepreno, por kiu la nekonataj kunlaborantoj devus meriti dankon kaj estimon pli multe, ol tielan akran kaj tute nemerititan rifuzon!

Mi tute havas la opinion, ke estas treege dezirinde, ke la honorinda aŭtoro de nia lingvo, la ĝeniala Zamenhof kaj aliaj fortaj kaj provitaj batalantuloj por la bona afero publikigus pli da belegaj kaj boneskribitaj artikoloj en la L. I. por la ĝojego de ĉiuj legantoj, sed mi tute ankaŭ petas ne forgesi, ke unue la nomitaj granduloj de nia afero havas ankaŭ aliajn devojn por si mem kaj por nia afero, kiuj eble malhelpas ilin skribi la deziratajn artikolojn por nia gazeto kaj ke due tiuj, kiuj havas hodiaŭ la tempon kaj antaŭ ĉio la bonan volon helpi al nia gazeto antaŭen per fidela kunlaborado, tre facilege povos esti malkuraĝigitaj ankoraŭ plue oferi tempon kaj laboradon por afero, kiu trovas tielan bonvolan juĝon de la ĝuantaj la frukton de tiu ĉi laborado!

Mi eble devas esperi, ke la gazeto ŝanĝus ĝian videblan malprogreson al progreso, se la estiminda aŭtorino prenis al si la laboron de ĉiuj nekonataj kunlaborantoj, kaj tamen mi dubas, ĉu la aŭtorino ankaŭ kun la plej bona volo estus en la situacio kaj ebleco, anstataŭ ĉiujn tiujn ĉi oferamulojn. Mi mem kredas ke la aŭtorino ne volis iri tiel malproksimen en ŝiaj konkludoj, sed tamen mi devas atentiĝi, ke facilege de aliaj samideanoj povus esti farotaj tiuj ĉi konkludoj el tielaj akraj juĝoj. Talento ja estas belega fakto, sed mi opinias ke hodiaŭ ni devus esti tute kontentaj, se ni trovas la sufiĉan nombron da kunlaborantoj por nia afero ankaŭ kun tio, ke multaj el ili bedaŭrinde ne ŝajnas posedi la talenton, kiu devus esti postulata de ĉiu »serioza ĵurnalisto« laŭ la opinio de l' estiminda aŭtorino.

Plue ankaŭ mi ne sentis plezuron aŭ ĝojon kaŭze de tro malfrua ricevo de la lastaj numeroj de L. I., sed malgraŭ tio ĉi mi opinias, ke estas multe pli facile simple postuli ol mem fari, kaj ke, se la redakcio efektive faras ĉion eblan por la pluekzistado de la gazeto, la abonantoj devus montri iom da indulgo, se la redakcio ne sukcesas ĉiam en ĉiuj punktoj. Mi mem ĉiam ĝojegos, ke la redakcio sukcesos plue eldoni la L. I.-n kaj mi opinias, ke ĉiu senantaŭjuĝa esperantisto pli multe devus helpi al la redakcio ĉe tiu ĉi dankinda entrepreno, ol fari al ĝi nemeritajn malfacilaĵojn.

Mi ĝis nun ĉiam estimis la gazeton L. I. kiel tute seriozan organon »tute indan de serioza rondeto« ! Mi ne povas kredi, ke mi estus tiel infano, por ke mi ne estus rimarkinta ĉiujn infanaĵojn de tiu ĉi malserioza gazeto; eble oni devas diri tion ĉi ankaŭ pri la ceteraj abonantoj, kiuj ŝajne ankaŭ ne trovis tro multe da infanaĵoj, ĉar neniu montris tiel malplaĉon ĝis nun. Cetere la rebusoj solaj ja ne faras la enhavon de l' gazeto, kaj la plej simpla rimedo devus esti por ĉiu, tiujn ĉi

ne legi, se ŝajnas al li tro infanaj por lia spirito !

Antaŭ mi tute ne miras, se efektive la nombro de la abonantoj de l' nuna L. I. pli kaj pli malpligrandiĝos, ĉar per tielaj akraj kaj forĵetantaj juĝoj apenaŭ oni povas esperi varbi fidelajn kaj certajn adeptojn por nia gazeto, sed eble oni sukcesos malkuraĝigi ankaŭ la abonantojn, kiuj ankoraŭ teniĝas al bona afero. Cetere mi ne scias, ĉu efektive la nombro de la abonantoj malprogresis anstataŭ progresis; eble la redakcio respondas, okaze al tiu ĉi demando.

La demando pri la disvastigado de nia afero jam tro multe estas priparolata, ke mi nur mallonge volas atingi tiun ĉi punkton. Sen ia reklamo hodiaŭ nenia afero povas progresi, estu ĝi ankaŭ tiel bona, kiel eble. Kompreneble nur, sen ia reklamo en bona senco. Se oni havas la intencon disvastigadi L. I.-n, oni tamen devas antaŭ ĉio konigi eble multajn homojn pri la fakto, ke nepre ekzistas internacia bone uzebla lingvo kaj ke tiu ĉi estas Esperanto. Ĉu tio ĉi ne estas ia reklamo? Mi tute devas konfirmi, ke la malgranda nombro da Esperantistoj dependas ĝuste de tio, ke la plej multaj homoj ne havas ankaŭ nur ideon de la ekzistado de nia lingvo, kaj ne dependas de la »videbla« malprogresado ankaŭ de nia tuta literaturo ! Tio ĉi estas nerifuzebila fakto, plej malmulte ĉe ni en Germanujo, kaj certe ankaŭ ĉe aliaj nacioj. Estas eble klare, ke tiel longe, kiam ekzistas tiu ĉi nesciado pri la ekzistado de nia afero, la grandeco aŭ malgrandeco de nia literaturo ne povos havi la plej malmultan influon je la progresado de nia afero. Kompreneble la senfina graveco de bona, granda kaj ĉirkaŭprenanta literaturo por nia afero mem estas certega, sed koncerne la disvastigado senkondiĉe kaj logike antaŭ ĉio devas esti celata la konigo de la ekzistado de nia lingvo ĉe eble multaj homoj, kaj mi timegas, ke tio ĉi ne povas

fariĝi sen iamaniera reklamo (en plej bona senco!) — Tiam fine leviĝos la demando de la sciemuloj, ĉu nia literaturo estas granda aŭ malgranda, bona aŭ malbona. Mi opinias, ke estus plej bone, se ĉiu samideano propagandas por nia afero laŭ lia persona bonvolo kaj bontrovo kaj laŭ liaj kapablecoj, estu nun sen aŭ per ia reklamo!

Koncerne nun la konfirmon, ke ne nur la gazeto, sed ankaŭ nia tuta literaturo bedaŭrinde malprogresas, mi tamen volus kredi, ke la estiminda aŭtorino juĝas iom tro malespereme! Efektive en la lasta tempo es'as eldonitaj pli malmultaj verkoj, ol pli frue, sed tiu ĉi fakto ne havas sian kaŭzon en tio, ke la fervoro de niaj verkistoj malvarmiĝis, sed en tio, ke ĉe niaj plej multaj aŭtoroj kaj samideanoj bedaŭrinde regas »superfluo de monermanko«, kiu ne permesas pagi la rilate grandajn kostojn de la preso. Kaj se hodiaŭ la societoj, prefere la glorinda S. p. p. Esp. eldonas nur parton de la mono por novaj presajoj, por ke ili havu la eblecon uzi la ceteran monon por la disvastigado de nia lingvo, por — *sit venia verbo* — la reklamo,

kredeble tio ĉi fariĝas en la ĝustega kalkulo, ke la plej granda kaj plej bona literaturo tute ne povas helpi al nia afero, se ni mem ne provizos kaj klopodos por disvastigi la scion de la ekzistado de nia lingvo kaj per tio ĉi due elveki la intereson por nia literaturo. Bedaŭrinde tio ĉi nur povas fariĝi per ia reklamo! Ĝis nun mi tute neniam rimarkis, ke la gazeto L. I. reklamis sin, kaj mi bedaŭras, ke la aŭtorino restis ŝuldanta la pruvon de tiu ĉi opinio.

Cetere ankaŭ mi salutis kun grandega ĝojo la fakton, ke D-ro Zamenhof kaj aliaj granduloj subtenus la gazeton L. I. per iliaj provitaj artikoloj, kaj en tiu ĉi deziro mi tute konsentas kun la estiminda aŭtorino, kiel n ambaŭ ja sekvas la saman idealan celon, laĵ disvastigadon kaj progreson de nia amata afero. Sed rekte pro tiu ĉi afero, mi estis devigita rifuzi kelkajn opiniojn de la estiminda aŭtorino, ĉar mi certe kredas, ke tielaj akraj admonoj eble volas la bonon, sed efektive faras la malbonon por nia afero, prefere malkuraĝon kaj apation ĉe niaj plej oferemaj samideanoj kaj kunlaborantoj!

D-ro Ad. Ebner.\*

— »**TEMPORA MUTANTUR.**« Dlogeno serĉadis en antikva tempo per *lanterno*, nun oni serĉas per — *mikroskopo*.

P. Ahlberg.

## SCIENCO PROGRESAS, ANTAŬJUĜOJ PEREAS.

La aperigo de la lingvo Esperanto en la mondo estis al mi sciita jam antaŭ dek jaroj. Tamen, nur en la fino de la jaro 1900 mi aliĝis al la kolegoj, lernantaj tiun ĉi lingvon. Kia kaŭzo do detenadis min daŭre tia longa periodo da tempo kontraŭ mia nuna aliĝo? La afero estas en la sekvanta cirkonstanco. Pli frue ankoraŭ estis elpensita Volapük. Kaj en tiu tempo mi tuj entreprenis lerni ĝin. Poste, baldaŭ oni ekvidis, ke Volapük mortis. Kvankam tiu lingvo estis bone kaj science prilaborita, tamen mankis al ĝi tia vivopovo, kiu en la lingvo Esperanto ĉarmas kaj altiras la multajn. Kaj prezentu al vi: tiu fakto, ke Volapük mortis, haltigas nun

forte la disvolviĝon de Esperanto. Almenaŭ, mi dum la tuta daŭro de dek jaroj ne donis al mi la penon ekoni Esperanton, nome nur laŭ mia antaŭjuĝo, laŭ mensoga kaj malvera opinio, ke se la unua provo estis malprospera, la dua estos dediĉita al simila sorto de perejo.

Tiamaniere pasis dek jaroj. Daŭre tiu intertempo Esperanto ne malaperis. Kontraŭe, nuntempe ĝi havas ĉiajn signojn de plimalproksima ekzisto. Mi decidiĝis konatiĝi kun ĝi kaj mi prenis en miaj manoj la lernolibron de Esperanto. Granda kvanto da esencoj vivecaj de la nova lingvo forte ekfrapis min. Kaj mi ekkredid, ke al tiu ĉi lingvo apartenos l' estonto. Nun mi

\* Ni ricevis ankaŭ aliajn opiniojn — koncernajn je tiu ĉi temo — de diversaj esperantistoj; sed ilian en preson, kiel ankaŭ de aliaj sciigoj en la »Kroniko«, pro manko de spaco, ni devas prokrasti ĝis la venonta numero

tre bedaŭras, ke mi ne preniĝis por lernado de tiu mirindega lingvo je dek jaroj pli frue.

Nuntempe, mi konstante konvinkiĝas, ke por internacia lingvo venis la tempo neprokrastebla. En la lasta centjaro la lernigo de la naturo pretigis fundamenton de rapida disvolvo de la nuntempa civilizado, ĝi sekvigis mirindan levigon de ĉiuj sciencoj kaj ĉirkaŭis nin per novaj sciadoj de ĉiuj flankoj, kiel la oceano ĉirkaŭas antaŭen portigantan ŝipon. Neniam antaŭ la homoj tiom skribis, tiom parolis, presis, elpensis sistemojn, tiom konstruis teoriojn. Ni transvivas unu el la momentoj de rapida evolucio de la civilizado. La mirega disvolvo de ĉiuj branĉoj de sciado vastigis la homan penson en neatingita grado ĝis la nuna tempo. La ekstreme rapidaj sukcesoj en la regiono de scienca penso kaj ĝiaj praktikaj uzoj metas la homaron en tia situacio, ke la diversaj nacioj nunepoke ne havas la tempon komuniki inter si siajn pensojn. Kaj tio estas neebila sen helpo de lingvo internacia.

Ni prenu, ekzemple, la regionon de literaturo. Se ekzistas sur la globo multe da lingvoj, kaj se en ĉia el ili ĉiujare aperigas po iom da produktaĵoj, meritantaĵoj fariĝi la havo de ĉiuj nacioj, jen estas ja necese ĉian verkon de unua nacio traduki en la lingvojn de ĉiuj ceteraj nacioj, ĉian verkon de dua, tria, kvara k. t. p. nacioj ankaŭ en la lingvojn de ĉiuj restaj nacioj kaj tiel

sen fino! Mallonge dirite, ĉia verko devas aperiĝi en centoj da tradukoj. Ĉu ne estus pli simple farigadi ĉiam nur unu tradukon de ĉiu aparta lingvo en la lingvon internacian. Tiam ĉia verko fariĝus atingebla por ĉiuj. Nur tiam la laboro de penso kaj de ĉiaj elmontraj de sentoj kaj de volo en la mezo de la popolaro civilizita konstruigos potencon fondon por pli fruktokrea disvolviĝo de sciado homara. Sole je kondiĉo disvolviĝo de lingvo internacia estos ankaŭ eble proksima unueco sciencaj fortoj, kiu de ĝia parto donos potencon puŝon al plimalproksimaj sukcesoj de l' homaro. Tiamaniere laŭ la disvolviĝo de internacia lingvo vastiĝos pli multe ankoraŭ la homa ĉirkaŭrigardo, kaj paŝo post paŝo leviĝos la mistera kurteno, post kiu kaŝiĝadis la pasintaĵo de l' homaro, kaj depreniĝos la kovraĝo de mistero de l' nuntempa vivo homara.

La aperiĝon de Esperanto oni devas opinii feliĉa finiĝo de la deknaŭa centjaro. La scienco ĉiam estis kaj estos progresema. El ĝi eliras grandegaj transturniĝoj de la vidmanieroj de l' homaro. La antaŭjuĝoj de la apartaj homoj do ĉiam malaperiĝas sub la influo de l' scienco. Oni povas plene esperi, ke daŭre la nova, XX-a, centjaro la penso kaj la volo de l' civilizita homaro alkondukos nin al perfekta floriĝo de nia kara Esperanto.

*N. Studenov.*

## KRONIKO.

### El Bohemujo-Moravujo.

— **Lernolibro bohema.** *Mezinárodní řeč Esperanto. Úplná mluvnice a cvičebnice se slovníkem esperantsko-českým a česko-esperantským. Dle autora Dra L. Zamenhofs ve Varšavě sestavili Čejka Th., Bilík V., Holub J. — Bystřice p. H. — Družstvo knihtiskárny P. Zapletala v Hranicích. Nákladem Th. Čejky v Bystřici p. H. 1900. — Cena 2 k.*

La bohema lernolibro, pri kies baldaŭa publikigo ni sciigis niajn legantojn jam antaŭ kelke da monatoj, nun estas preta kaj ricevebla por la bohemlingva lernantaro.

La verko, redaktita de s-roj Čejka, Bilík kaj Holub, enhavas post mallonga antaŭparolo

bohema, kiu prezentas ĉefe la konatajn prijuĝojn de grafo Leo Tolstoj kaj de profesoro Max Müller pri Esperanto, kune kun la enkonduko Zamenhofs kun apuda bohema traduko, la gramatikon sur kvar aŭ kvin paĝoj.

La reguloj prezentitaj en tiu ĉi gramatiko estas precize tiuj de la mallonga gramatiko Zamenhofs. Tio ja povas sufiĉi, sed sendube estus bone por la lernantoj, se ili ankaŭ ricevus kelke da reguloj krom tiuj ĉi, kun speciala traktado de la diferencoj de la nacia lingvo rilate al la internacia, ĉar la plejmultaj homoj ne estas kutimigitaj pensadi logike kaj pro tio per si mem ne scias liberigi sin de la specialaĵoj ofte strangaj de ilia nacia lingvo.

Oni ofte vidas en la lernolibroj la diron, ke la Esperanta respondaĵo de la ablativo estas formata per la prepozicio »kun«. Tio ĉi ne estas korekta, ĉar »kun« signifas ne la ilan formon, sed esprimas nur akompanan cir-

konstancon ; la formo ablativa estas esprimata kun la helpo de l' prepozicio »per«. — Oni parolas *kun* amiko, kaj *per* la buŝo. Oni skribas *per* la mano. *Kun* ĝojo oni aŭskultas belan kanton.

En la paragrafo pri la participaj formoj nenio estas dirita pri la formoj finiĝantaj per e, kiuj portas tamen tre gravan rolon en la lingvo.

Tiuj ĉi malgravaj rimarkoj, kiuj absolute neniel havas la celon nek la povon iom ajn malgrandigi la indon de la verko, estas fari-taj, por ke la aŭtoroj — se ili trovos tion utila — povos ŝanĝi la eblajn mankojn en la venonta eldono de la verko.

Post la gramatika parto sekvas la tuta ekzercaro Zamenhofs — sendube la plej bona maniero prezenti samtempe bonegajn modelojn de nia lingvo kaj la sintakson de Esperanto.

La ceteraj ekzemploj donitaj el nia literaturo konsistas en kelke da Ezopaj fabeloj, tradukitaj de I. Lojko.

Oni povus rimarki pri tiuj ĉi verkaĵoj, ke ili ne estas tute klasikaj, ĉar en ili neniam estas uzata la difiniga antaŭvorteto »la«. Krom tio oni tie trovas tiajn frazojn kiel ekzemple : »malfacile estas vivi al malriĉulo« ; »vivi al malriĉulo« ne devus esti kunligite, ĉar »al malriĉulo« apartenas en tiu ĉi frazo al »malfacile« aŭ al »estas«, kaj tial ĝi devas esti lokita sendise kun unu el tiuj vortoj, ne kune kun »vivi«. — Tio ĉi tamen estas tre pedanta rimarko, kaj je tiu ĉi regulo oni oftege sen-pune kulpas.

El »L. I.« 1899 estas ĉerpita la rakonto »Karma« de Leo Tolstoj, tradukita de B. Spector. La literatura parto de l' verko finiĝas kun la komencaĵo de la Biblio, unu letero kaj la kanto Espero. La letero sendube estas presita laŭ la plej malnova eldono de la lernolibro

de d-ro Zamenhof, ĉar ĝi uzas la formojn »kian« anstataŭ »kiam« ; »tian« anstataŭ »tiam« — formoj, kiujn forĵetis la doktoro jam en la plej unuaj jaroj de l' ekzistado de la lingvo internacia.

La du vortaroj Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-esperanta okupas la plej grandan parton — pli ol cent paĝojn — de la verko. Ili ŝajnas esti sufiĉe plenaj kaj tre bonaj. En la vortaro Esperanta-ĉeĥa estas enmetitaj ne sole la vortoj de la Universala vortaro, sed ankaŭ kelke da aliaj komune uzataj en nia literaturo.

En la fino de l' verko oni trovas kolekton da geografiaj nomoj\* k. t. p., unu folion da interparoladoj, ĉerpitaj el la »Kondukanto« de Grabovski ; kaj laste nomaron de mono de diversaj landoj, nomaron de la literaturo de Esperanto ĝis la 1-a de dec. 1900 kun 138 numeroj da verkoj.

Ankaŭ ne mankas anoncoj pri la esperantistaj gazetoj nek aliaj informoj valoraj por la novaj esperantistoj.

Kiel oni bone komprenas, estas por ni preskaŭ neeble eldiri pri la verko ian intiman prijuĝon, ĉar ni ne scias la ĉeĥan lingvon ; sed laŭ la pli-malpli superflanka koniĝo kun la verko ni ricevis la opinion, ke ĝi estas bonege verkita.

Tio, kion ni povas diri certe kaj pro plena scio, estas, ke la libro sin distingas pro ĉarma tipografia aranĝo, bona papero kaj belega preso.

Sendube la verko estos salutata de la ĉeĥoj — nacio tre interesita por ĉiaj spirita ekzercadoj, kaj kial do ne por Esperanto ? — kun ĝojo, kaj kontentigos bone la bezonon de Esperanta lernilo por tiu nacio.

La kosto estas du aŭstraj kronoj.

\* Oni ne skribu »Brno«, »Nev-Jorko«, sed *Berno*, *Nov-Jorko*.

### El Francujo.

— Jarlibro 1900—1901, kiel en jaro pasinta, estis eldonita de la Societo por la propagando de Esperanto ankaŭ en la komenco de tiu ĉi jaro. — Ĝi enhavas, krom la regularoj de S. p. p. Esp. kaj de ĝia speciala branĉo »Internacia Korespondado Esperanta«, la nomojn kaj precizajn adresojn de ĉiuj membroj de la Societo. La nombro de la societanoj estis ĉe la jarfino 435. Antaŭ unu jaro ĝi kalkulis en si 350. Tiuj kvarcent tridek kvin homoj reprezentas 24 diversajn landojn en kaj ekster Eŭropo.

La jarlibro, kiu estas bona adresaro esperantista, estas ricevebla ĉe la sekretario de S. p. p. Esp. en *Epernay* (Marne), Francujo, por la kosto de 1 franko.

— **El Dijono** ni ricevis la sekvantan ĝojigan leteron oficialan:

»La Grupo Esperantista de Dijon — aprobita de la Societo por la propagando de Esperanto — enhavanta hodiaŭ 108 membrojn, havas la honoron sciigi al la redaktoro de la *Lingvo Internacia*, ke ĝi estas fondita la 21-an de januaro lasta. Decidinta energie partopreni en la penado de ĉiuj esperantistoj por la rapida sukceso de nia entrepreno, la Grupo tre amike salutas lin.

Dijono, la 22-an de marto 1901.

La sekretario ĝenerala:

L. Roy.

Adr.: str. Colson, Dijon (Côte-d'Or.)«

Ni kaj kun ni certe ĉiuj esperantistoj kore kaj amike salutas niajn kunfratojn en Dijono, gratulante ilin pro la sukcesopromesa komenco.

— **Monofero.** S-ro F. Lallemand el Dijono sendis al ni 2 frankojn kiel monoferon por la fondkapitalo de nia gazeto kaj promesis, ke li instigos ankaŭ la aliajn dijonaĵojn samideanojn fari same. — Dankon!

### El Rusujo.

— Nia fervora amiko, s-ro F. Postnikov, skribas al ni, ke li, kvankam entute ne havanta liberan tempon por sin okupi per Esperanto kaj ĝin propagandi, li tamen vendis en Vladivostok ne malpli ol kvardek lernolibrojn kaj ĉirkaŭ tiom da lernolibroj li disdonis dum dek monatoj. (Li alveturis Vladi-

vostokon en februaro 1899.) En Vladivostok, Ĥabarovsk, Port-Arthur kaj kelkaj lokoj de Mandĵurio vivas dissemitaj bonaj esperantistoj, pri kiuj oni preskaŭ nenion aŭdas, ĉar en nunaj cirkonstancoj ili ĉiuj estas premegataj de febra, senhalta laboro.

### El Svedujo.

En n-ro 36 de l' ĉiutaga kaj en n-ro 7 de l' ĉiusemajna eldono de la stokholma gazeto »*Vårt Land*« (la 12-an respektive la 14-an de febr. 1901) oni legis la rakonton de A. Ĉeĥov, presitan en tiu ĉi numero de nia gazeto sub la rubriko »*Tro*«. La sveda traduko en »*Vårt Land*« portis la sciigon, ke ĝi estas »tradukita el Esperanto«.

—\*\*—

### El Esperantujo.

— **Adresaro de la Esperantistoj. Serio XXI. Nurnbergo. Presejo de Wilh. Tümmel. 1901.** Nr. 140 en la literaturo. Kosto 40 centimoj.

La estiminda doktoro L. Zamenhof sendis al ni tiun ĉi lastan serion de la Adresaro, kiu enhavas la novajn esperantistojn, kiuj aliĝis dum la jaro 1900.

La verko donas la nomon kaj adreson de 541 esperantistoj sub la numeroj 5026—5567. Krom tiu ĉi ĉefa rubriko ĝi enhavas: ŝanĝitajn adresojn, ripetitajn adresojn, alfabetan registron de la nomoj, alfabetan registron de la urboj, kaj la altirintojn.

Montriĝas ke Rusujo alportis ankaŭ al tiu ĉi adresaro la plej grandan nombron, nome 163; post ĝi sekvas Francujo kun 148 kaj Bulgarujo kun 103 aliĝintoj. Malpli grandan aliĝantaron liveris Aŭstro-Hungarujo kun 50 kaj Svedujo kun 35. Belgujo donis 11; Augloj kaj Italoj estas reprezentataj per po 5; Braziloj kaj Germanoj enestas po 4, Hispanujo 3. Ĥinujo, Islando, Rumanujo kaj Unuigitaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko liveris po 2; Holando, Norvegujo kaj Svisujo po 1.

Inter la apartaj lokoj reprezentitaj sin distingas antaŭ ĉiuj la franca urbo Dijono, kiu sola alportis 47 nomojn.

La lastajn paĝojn de la kajero okupas la nomaro de la literaturo. En la fino sin trovas varmega rekomendo de la du gazetoj Esperantaj »*L'Espérantiste*« kaj »*Lingvo Internacia*«.

La Adresaro kaj ĉiuj aliaj verkoj Esperantaj estas riceveblaj de d-ro L. Zamenhof en Varsovio, str. Dzika Nr. 9. — Rusujo.



## LA OKULVITROJ DE L' PRINCO.

— Verkis angle sinjorino **Laura Ridding.** —

*»Into the truth of things  
Out of their falseness rise . . .«*

*Browning.*

Estis la naskotago de l' princo Alethiades: li atingis la plenaĝon. La reĝo vokis lin al si en la jaspisan salonon de l' palaco, kie antaŭ sia kolektiĝinta kortegano li diris la sekvantan mallongan sed solenan paroladon al la juna princo:

»Mia filo, antaŭ ol la festo jam komencas, mi havas la komision transdoni al vi objekton de plej granda graveco. Via baptopatrino, la feino laŭ kies nomo vi estas nomita, en mian konservon konfidis multekostan donacon, kiu fariĝas hodiaŭ via posedaĵo.« — Kun tiuj vortoj li metis kesteton en la manon de l' princo.

Alethiades malfermis ĝin kaj elprenis el ĝi magian okulvitron, kiun li surmetis.

Kiam li rigardis tra ĝi, lia vizaĝo ricevis tute alian esprimon. En agonia malespero li turnis sin de l' patro al la korteganoj, la korpgardistaro, la servantoj. Post tio li disetendis la brakojn kun furioza ekkrio, kuregis mal-supren laŭ la marmora ŝtuparo en la ĝardenojn, rapidegis tra la irejoj kaj la floraleoj, eksteren en la vastan parkon — for, for tiom longspace kiom fulmerapidaj piedoj povis lin porti, ĝis lin haltigis granda laĝeto, kiu kuŝas kiel neevitebla baro en lia vojo. Serio da altaj kanoj ĉirkaŭbaris tiun akvon, kaj ili kapobalancis al li dirante: »Ho, vi, kies okuloj estas malfermigataj, vidu kaj rigardu la devenon de ĉio!« Kaj li enrigardis en la profundajon kaj vidis senformajn, nigrajn monstrojn, kiuj sin movas tie sube, kaj vidis flugilajn estaĵojn en la plej brilantaj koloroj sin swingi super la akvo.

»Tio ĉi estas la laĝeto Pensa, kie naskiĝas la pensoj de la homoj, la veraj kiel ankaŭ la malveraj. Iru plu, kaj vi renkontos ilin en aliaj formoj.« Kaj Alethiades eniĝis en malgrandan ŝipeton, konstruitan el kunkreskaĵoj, kaj veturis per ĝi al la alia bordo.

Li iradis plu, ĝis li alvenis al granda arbaro. Milionoj da flugilaj, insektosimilaj estaĵoj de stranga formo zumflugadis inter la branĉoj. »Gardu vin kontraŭ la danĝero!« kriis la arboj al la juna princo, kaj li vidis kaj observis, ke kelkaj en tiu fluganaro brilis kiel fajromuŝoj kaj ŝajnis per sia tuŝo sole elvolvi la florojn kaj maturigi la fruktojn de l' arboj sur kiuj ili sin lokis, aliaj tamen estis, kiuj per sia tuŝo nigrigis kaj velkigis la foliojn kaj kiuj, rampante sur ili dedonadis kaŭterizan venenon, kiu mortigis ĉion, kio estas en ilia vojo.

»Tio ĉi estas la arbaro Vorta. Ĉiuj vortoj, kiujn elparolas la homoj, alflugas tien ĉi, tuj kiam ili ekhavis la formon: la mensogo, perfido kaj malico kun siaj veziko de veneno, la vero kaj la bravkuraĝo kun sia vivodona mielo. Ili estas elpensataj en la laĝeto Pensa kaj flugas poste plu al la kampo Aga. Daŭrigu!«

Kaj li daŭrigis sian iron, ĝis li atingis tiun ĉi lokon. Tie, meze en la kampo, daŭris furioza batalo, la granda mondbatalo inter la Vero kaj la Mensogo, daŭrinta jam de l' komenco de l' mondo. Meze inter tiuj batalantaj anaroj lumis klara brilo, kiu alproksimiĝis al Alethiades, kaj kiam ĝi alvenis al li, li vidis, ke estas belega virino — la Vero mem,

Li jetis sin al siaj piedoj, ekblindigita per sia radianta brilego.

— Filo mia, — diris ŝi, — vi, kiu faras uzon de mia donaco, ĉu vi volas aliĝi al miaj fidelaj ĉevaliroj kaj defendi mian honoron ĝis en la morto.

— Anĝelosimila feino! — ekkriis la princo, — via terura donaco plenigis miajn okulojn per doloro. Ĝi malkovris al mi la vanecon de mia vivo kaj la misterajn efikojn de la pensoj, vortoj kaj agoj. Mi ne povas reiri al mia

ĝisnuna vivo malvera. Lasu min batali tie ĉi por vi... en la plej furioza batalo kaj tie, kie estas plej granda la danĝero! Pro favoro, aŭskultu mian preĝon!

Ŝi metis siajn manojn sur liajn okulojn kaj kondukis lin longe for.

— Jen estas via posteno. Defendu ĝin al mi! — diris ŝi kaj malaperis. La princo ekrigardis kaj vidis, ke li sin trovas ree en la jaspisa salono, kie la reĝo kaj la korteganoj kun miro lin rigardegis.

Trad. P. Nn.



(El A. Majkov.)

*Sur la promontoro, per velka karekso \* kronita,  
Kovrita per sekaj arbetoj kaj pinoj verdantaj,  
Malĝoja Menisko, maljuna fiŝist', enterigis  
Dronintan jun-filon. Mortinton englutis la maro  
Kaj ĝi lin alprenis en sian la bruston larĝegan;  
Sed poste sur bordon alportis la korpon mortintan.  
La filon plorinte, la patro sub densa saliko  
Elfosis la tombon por li kaj ĝin kovris per ŝtono;  
Plektitan kaptilon por fiŝoj li pendis sur tombon;  
Por ke monument' mizerega estadu.*

Tradukis

A. Fjodorov.

\* Botanika nomo de speciala herbo.



## LA NOKTO BLANKA DE HUSARO RUĜA.

Multajn fojojn mi demandis min, kial oni nomas noktojn »blankaj« tiujn kiujn oni pasigas ekster sia lito. Mi ĵus pasigis unu el ili kaj mi ĝin trovis plivere . . . . . *verda*.

Kio ne malhelpis mian pordiston, kiam mi reeniris, matene, min saluti kun moka rideto, kiu, verŝajne signifis:

»Ha! ha! mia bonulo, oni estas sin amuzinta!«

Kaj tamen! . . . Sed, ni ne iras antaŭen tiel rapide.

Unue, mi devas diri al vi ke, de kelkaj tagoj, mi ekamis.

Ho! mi ekamis! vi scias . . . ne ĝis pere! . . . sed, tamen, mi estis iomete korkaptita.

Estis malgranda blondulino, tre ĝentila, kies frunto estis kovrita per frizharetoj. Ĉiafoje, kiam mi pasis, ŝi metis sin je sia fenestro.

Antaŭ ŝia domo, pasinte kaj repasinte multfoje, mi ekkredis ke ŝi estis min rimarkinta kaj mi ridetis al ŝi.

Eĉ mi kredis — vi scias kiom oni estas naiva! — ke ŝi ridetis al mi.

Estis eraro. Pri tio, mi estas havinta la certecon absolutan, sed tro malfrue, — bedaŭrinde!

Iam, mi diris al mi: »Estas necese ke mi prenu decidon!«

Atendante, mi informserĉas lerte, ne tro montrante mian scivolon.

Ŝi estas edziĝinta je malbona sinjoro, laŭ la publika diro, kiu direktas gravan fabrikon de paflegoj.

La malbona sinjoro eliras el sia hejmo ĉiuvespere ĉirkaŭ je la oka horo kaj reeniras tre malfrue en la nokto.

»Bone,« mi diris al mi, »estas precize tio kion mi deziras!«

Tio ĉi okazis ĉirkaŭ je l' karnavalttempo. Pro tiu festo, mi estis invitita je maskobalo. Oni scias ke mi havas multe da sprito. Pro tiu, ĉiuj amikoj estis dirintaj al mi: »Havu kostumon ridindan!«

Kaj, de l' mateno, mi vestas min kiel husaro ruĝa de Monako.

Vi diros al mi, ke ne estas husaroj ruĝaj ĉe Monako, ke estas eĉ neniam husaro aŭ ke, se estas kelkaj, ili estas kutime vestitaj kiel nemilitistoj.

Tion ĉi mi scias tiel bone kiel vi, sed ĉu la kaprico ne senkulpigas ĉiujn neĝustatojn?

Dum mi admiris min per la spegulo de mia ŝranko, mi diras al mi: »Nu, estus ja la okazo vizitiri mian blondulinon. Ŝi povos nenion rifuzi al husaro ruĝa havanta tiel belan teniĝon!«

Estas vere ke mi estas belega, tiel vestata! Tute perfekte belega eĉ!

Mi vespermanĝas frue . . . Bona vespermanĝo, nutraĵo altgusta, por doni al mi fortojn, malsekigita per vinoj ekscitantaj por doni al mi . . . senhontecon!

Mi ĉirkaŭligas mian glavrimenon, ĉar mi havis glavon, kompreneble, kaj jen estas mi preta por la atako.

Alveninte al la domo de mia amatino mi ekvidas ŝian edzon forirantan.

»Bone, ĉio iros bone!«

Mi donas al li sufiĉe da tempo por malproksimiĝi, kaj mi supreniras la ŝtuparon, senbrue, pro la spronoj kiujn uzi mi ne multe kutimis kaj kiuj estas tre longaj ĉe la husaroj ruĝaj.

Mi tiras la piedeton de malfeliĉa kapreolino kiu plenumas nun la oficon de maneto de sonorilo.

Malpeza paŝo aŭdiĝis malantaŭe la pordo, oni malfermas!

Estas ŝi! . . . mia blondulineto . . .

Mi diras al ŝi . . .

Kion mi estas povinta diri al ŝi?

Ĉar, kiel vi scias, en tiaj momentoj oni diras tion, kio venas al la penso kaj kvin minutoj poste, oni estus certe mortigita per pendilo se oni estus devigota ĝin ripeti.

Sed tio kion mi memoras perfekte, estas ke ŝi respondis al mi, malŝate:

»Ĉu vi estas freneza, sinjoro? Kaj mia edzo kiu ĵus devas reeniri . . . Mi jam lin aŭdas.«

Kaj, ŝi fermegas la pordon antaŭ mia nazo.

Efektive, iu supreniris la ŝtuparon, per paŝo multepeza, — la paŝo teruriga de l' edzo senkompata!

Malgraŭ ke mi estis husaro ruĝa, mi ek-tremis, mi ĝin konfesas!

Vi diras al mi ke estis tamen nekomplicita rimedo por eltiri sin el tia situacio: mal-supreniri la ŝtuparon kaj foriri tute simple! Sed, kiel rimarkigis prave poeto angla, la plej simplaj ideoj estas tiuj kiuj alvenis la lastaj.

Mi pensis pri ĉio, — krom foriri.

Momente mi havis la ideon eltiri mian glavon kaj atendi la edzon, kuraĝe.

»Tiu rimedo estas stupida kaj „suspektigebla“, — mi diris al mi.

Subite mi ekvidis malgrandan pordon kiun mi ne estis vidinta tuj, ĉar ĝi estas marmor-pentrita kiel ankaŭ la tuta aleo, cetere . . . sed! kia marmoro ridinda! . . . vera marmoro de karnavalttempo! . . .

Cetere, en tiuj momentoj, oni ne malŝparas sian tempon je malserioza estetiko.

Mi malfermas la pordon kaj eniras la lokon ne min demandante kien mi iras.

Unu sekundo plie kaj la edzo alvenis supren je la ŝtuparo.

Mi aŭdas ĝrincon de ŝlosilo en seruro, pardon kiu malfermiĝas, pardon kiu fermiĝas, — la sama, sendube, — kaj mi povas fine enspiri . . .

Nur tiam mi ĉirkaŭrigardas la lokon, kie mi trovis la savigon.

Neniam vi estus divenanta la lokon, en kiun mi estis enirinta.

Vi ridetas . . .

Vi do estas divenintaj? . . .

Nu, jes, — estis »Tie« . . . aŭ plivere »Tie ĉi.« \*

Dolĉe, senbrue, mi eklevas la pordfermilon, kaj mi puŝas la pordon. Ĝi kontraŭstaras.

Mi puŝas forte . . . pli forte ankoraŭ, — kun energio superhoma. La pordo kontraŭstaras ĉiam! absolute kiel pordo kiu havas gravajn motivojn por ne malfermiĝi.

Mi diras al mi: »Estas la malsekeco kiu estas ŝvelinta la lignon.« Mi prenas apogponton kontraŭ la — seĝilo, kaj, han! mi puŝas . . . Klopodo senfrukta!

Vere, estas bonega meblaĵo.

Ideo abomena trapasas mian cerbon.

Ĉu l' edzo ekvidinte min kaj diveninte miajn intencojn estas enferminta min, dank' al riglilo ekstera.

Kia situacio por husaro ruĝa!

Kaj mi kiu estas atendata je maskobalo!

Ne, ne! Estas neeble! Mi forpelas de mi tiun doloran penson.

Kaj, tamen, la pordo staras senmove kiel ŝtonego.

Konsterniĝinta, mi sidiĝas. Feliĉe ke oni povas sidiĝi en tiuj lokoj! . . . Kaj mi atendas.

Estas neeble ke oni ne venu min liberigi.

Ho ve! oni venas malrapide. Oni venas eĉ tute ne!

»Kion ili manĝas do en tiu domo?«

\* En Francujo oni skribas tiujn ĉi du vortojn sur la pordoj de la lokoj, pri kiu oni parolas supre.

»Koinkonfitaĵojn, sendube «

De la strato supreniras ĝis miaj oreloj gaja bruego de trumpetoj, de ĉastrumpetoj, de ĉiuspecaj muzikiloj . . . kaj ankaŭ, malĝoja tiuj ĉi — la sonaĵoj de l' murhorloĝoj . . . la kvaronhoroj . . . la duonhoroj . . . la horoj . . .

Kaj la savonto atendata kiu ne alvenas!

»Ĉu ĉiuj loĝantoj estas englutintaj bismuton hodiaŭ?»

»La proksiman fojon kiam mi revenos en tiu ĉi domo, mi sendos melonon al ĉiu el ili!«

De tempo al tempo, kun malespero korduŝanta mi stariĝas, kaj unuigante mian tutan energion, mi puŝas la pordon . . . mi puŝas . . . mi puŝadas . . .

Ha, vere, — estas bona pordo.

Fine, konsumite, mi rifuziĝas la batalon.

La tenilo de mia glavo penetras mian flankon. Mi ĝin kroĉas al pordfermilo kaj mi endormiĝas.

Dormo malkvieta, intermiksita per teruraj songoj.

La bruo de l' strato ĉesiĝas iom post iom. Oni aŭdas nur ĉastrumpeton kiu obstiniĝas heroe en la malproksimaĵo.

Poste, la ĉastrumpetisto mem kuŝiĝas kiel la tuta mondo. — — — — —

Mi ekvekiĝas. Jen estas la antaŭmateno!

Mi frotas miajn okulojn kaj mi rememorigiĝas ĉion! . . .

Mia sango de husaro ruĝa trakuregis mian korpon. Kolerege mi malkroĉas mian glavon kaj mi ĝin tiras al mi! — — — — —

Mi ne kuraĝas al vi diri la ceteron.

Kia idiotulo mi estis! . . . Duobla idiotulo! triobla idiotulo! Centobla idiotulo! . . . milobla idiotulo! — Mi estis pasiginta la tutan nokton puŝante la pordon . . .

Ĝi malfermiĝis *internen!* . . .

(Noveleto de Alphonse Allais.)

Kun la permeso de l' aŭtoro tradukis

**Léon Beau**, membro de l' Esperantista Grupo Dijona.



## TR O.

(De A. Ĉĉĥov.)

Termezuristo Gleb Gavriĵoviĉ\* Smirnôv alveturis al stacio »Gnilŭŝki«. Ĝis la bieno, kien li estas invitita por limigi, restis ankoraŭ veturi per ĉevaloj verstojn tridek-kvardek.

\* Duoblakcento sur vokalo signifas nur, ke oni metu sur tiu silabo la tonpremon, la akcentadon de la vorto.

*Rim. de l' red.*

— Diru, mi petas, kie mi povus trovi poŝtajn ĉevalojn? — sin turnis la termezuristo al la ĝendarmo de la stacio.

— Kiujn? poŝtajn? . . . ĉi-tie de cent verstoj bonetan hundon trovi estas neeble, ne solan poŝtĉevalojn . . . Kaj vi kien veturas?

— En Dĉvokino, la bieno de generalo Hôhotov.

— Kion do? — ekoscedis la ĝendarmo.  
— Iru vi post la stacion, tie en la korto iam estas vilaĝanoj, ili veturigadas vojaĝantojn.

La termezuristo ekĝemis kaj ekpaŝis post la stacidomo. Tie post daŭraj serĉadoj, interparoloj kaj ŝanceliĝoj, li trovis fortegan vilaĝanon, malafablan, plenan je cikatroj kaj vestiĝinta per disŝirita vilaĝana surtuto kaj bastaj ŝuoj.

— Diablo scias, kian veturilon vi havas!  
— sulkiĝis la termezuristo, enmetante sin en la veturilon: — Ne eble estas kompreni, kie ĉe ĝi estas posta, kie antaŭa parto . . .

— Kion ĉi-tie komprenadi? Kie la ĉevala vosto, tie la antaŭa parto; kaj kie sidas via moŝto, tie la posta parto estas . . .

La ĉevalo estis juna, sed malgrasa, kun piedoj disstariĝantaj kaj oreloj multmorditaj. Kiam la veturigisto sin levetis kaj ekbatis ĝin per la ŝnura vipo, ĝi sole ekskuis la kapon, kiam li ekinsultis kaj ekvipis ĝin ankoraŭ unufoje, la veturilo ekkriis kaj ekstremis, kiel en febro; post la tria ekbato la veturilo ekbalancis, post la kvara ĝi ekŝoviĝis de la loko.

— Tiamaniere ni veturos la tutan vojon?  
— demandis la termezuristo, sentante la trean skuon kaj mirante la kapablecon de rusaj veturigistoj kunigi malrapidan, testudan veturon kun animeturnanta skuo.

— Ni ĝisvetu-u-ros! — trankviligis la veturigisto. — La ĉevalineto estas juna, vigla . . . Permesu nur al ĝi sin rapidigi, tiam poste ĝin oni ne haltigos . . . No-o-o, malbenita! . . .

Kiam la veturilo eliris el la stacikorto, estis krepusko. Dekstre de la termezuristo etendiĝis malluma frostiĝinta ebenaĵo, sen fino kaj rando . . . Se oni veturus sur ĝi, kredeble oni alveturus al ia diabla posedaĵo. Sur la horizonto, kie ĝi malaperis kaj kunfluiĝis kun la ĉielo, malrapide finbrulis malvarma aŭtuna ĉielruĝo . . . Maldekstre de la vojo en la mal-

lumiganta aero sin levis iaj tuberoj, ĉu fojnaj amasoj de la estinta jaro, aŭ vilaĝo. Kio estis antaŭe, la termezuristo ne vidis, ĉar de tiu ĉi flanko la tutan kampon da vido kovris la larĝa malgracia dorso de la veturigisto . . . Estis senvente, sed malvarme, froste.

Tamen, kia tie ĉi estas senviva loko!  
— pensis la termezuristo, penante kovri siajn orelojn per la kolumo de la mantelo. — Nek korto, nek eĉ stango renkontiĝas. Se oni atakus kaj rabus, neniu eĉ scius, se eĉ el pafilegoj oni pafus . . . Kaj la veturigisto estas nefidinda . . . Vidu, kia dorsego! Se tia infano de la naturo tuŝos per fingro, eĉ tiam la animo for! Kaj vizaĝego lia besta, suspektinda. — He, kara, — demandis la termezuristo, — kia estas via nomo?

— Mia? Klim.

— Nu, Klim, kiel estas ĉe vi ĉi-tie? Ne estas danĝere? Ne malbonfaradas oni?

— Ne, Dio favoras . . . Kiu do malbonfaradus?

— Ĉi-tio estas bone, ke oni ne malbonfaradas . . . Sed pro okazo ia mi prenis kun mi tri revolverojn, — ekmensogis la termezuristo. — Kun revolvero do, vi scias, ŝercoj estas malagrablaj. De deko da rabistoj estas eble sin defendi . . .

Estis mallume. La veturilo subite ekkraakis, ekkriis, ekstremis kaj, kvazaŭ kontraŭvole, sin turnis maldekstren.

»Kien do li min ekveturigis?« pensis la termezuristo. »Li veturadis ĉiam rekte kaj subite maldekstren. Kion bonan esperi, li deveturos, fripono, en ian sovaĝan lokon kaj . . . kaj . . . Estadas ja okazoj!«

— Aŭskultu vi, — sin turnis li al la veturigisto. — Tiel vi diras, ke tie ĉi estas ne danĝere? Tio ĉi estas domaĝe . . . Mi amas kunbati kontraŭ rabistoj . . . Vidŝajne mi estas malgrasa, malsana, sed la forto en mi, kiel

en bovo . . . Unufoje ekatakis min tri rabistoj . . . Tiam, kion vi opinias? La unuan mi tiel *traĥis*\*, ke . . . ke, vi komprenas, li dedonis al Dio la animon, kaj la du aliaj ekiris Sibirion por punlaboroj. . . . De kie ĉe mi aperas la forto, mi ne scias . . . Mi ekkaptas per unu mano iun sanegulon, similan al vi, kaj . . . kaj faligas.

Klim ekrigardis posten la termezuriston, ekpalpebrumis per la tuta vizaĝo kaj ekvipis la ĉevaleton.

— Jes, frateto, — daŭrigis la termezuristo. — Ne lasu Dio iun kun mi havi faron. Ne sole la rabisto sen la manoj kaj piedoj restos, sed ankoraŭ antaŭ juĝo respondos . . . Kun mi ĉiuj juĝistoj kaj distriktestroj estas konataj. Mi estas homo regnaĵa, bezona . . . Mi ja veturas, kaj al la estraro estas sciata . . . Ĝi atente rigardas, por ke iu ne faru malbonon . . . Ĉie laŭlonge de la vojo post arbaretaj *urjâdnikoj* kaj *sôtskoj*\*\* estas disŝovitaj . . . Ha . . . hal . . . haltu! — ekkriegis subite la termezuristo. — Kien do vi estas enveturinta? Kien vi min veturigas?

— Ĉu vi ne vidas? Arbaro.

»Efektive, arbaro«, ekpensis la termezuristo. »Kaj mi tiel ektimis! Tamen estas malbezona elmontri mian maltrankvilecon . . . Li jam rimarkis, ke mi estas malkuraĝa . . . Kial li komencis tiel ofte rerigardadi al mi? Certe li intencas ion . . . Antaŭe li veturis iom-iom, paŝo post paŝo, kaj nun jen kiel rapidegas!« — Aŭskultu, Klim, por kio vi pelas tiel la ĉevalon?

— Mi ĝin ne pelas, ĝi mem estas sin rapidiginta . . . Kiam nur ĝi sin rapidigis, tiam per nenia maniero ĝin oni povas efiki . . . ĝi mem estas malĝoja, ke ĝi havas tiajn piedojn.

— Mensogas vi, frato! Mi vidas, ke vi

mensogas! Tamen mi ne konsilas al vi tiel rapide veturigi . . . Haltigu iom la ĉevalon . . . Ĉu vi ne aŭdas? Haltigu!

— Pro kio?

— Pro tio . . . pro tio, ke post mi de la stacio devas alveturi kvar kolegoj. Estas bezone, ke ili nin atingu. Ili estas promesintaj atingi min en tiu ĉi arbaro. Kun ili estos gaje veturi. Ili estas homoj sanegaj, potencaj . . . Ĉiu havas po pafleto . . . Pro kio vi ĉiam rerigardadas kaj sin movadas kvazaŭ vi sidus sur kudriloj? He? Mi, frato, tion . . . frato . . . Sur mi rerigardi estas ja por nenio . . . mi ne prezentas ion interesan . . . Ĉu solaj la revolveroj . . . Mi estas preta, se vi volas, ilin mi elprenos, montros . . . Volu . . .

La termezuristo eksimiligis, ke li serĉas en la poŝoj, kaj en tiu ĉi tempo okazis tio, kion li ne povis atendi . . . Klim subite sin elfaligis el la veturilo kaj per la manoj kaj la piedoj ekkuris al la densejo.

— Helpon! — ekkriis li. — Helpon! Prenu vi, malbenita, kaj la ĉevalon, kaj la veturilon, sole ne perdu mian vivon! Helpon!

Estis aŭdataj la rapidaj forirantaj paŝoj, la krako de vergaĝo — kaj ĉio eksilentis . . . La termezuristo, kiu ne atendis tian rezultaton, unue haltigis la ĉevalon, poste sin sidigis pli oportune sur la veturilo kaj komencis pensadi.

»Li forkuris . . . ektimis, la malsaĝulo . . . Nu, kiel nun mi agos? Mem mi daŭrigi la veturon ne povas, ĉar mi ne scias la vojon, kaj oni povas opinii, ke mi de li ŝtelis la ĉevalon . . .«

— Klim! Klim!

— Klim! — respondis la eĥo.

Pro la penso, ke tutan nokton li devos sidi en la malluma arbaro en malvarmo kaj aŭdi sole lupojn, eĥon kaj spirblovojn de la malgrasa ĉevalino, — tremo ekgratis la ter-

\* *Traĥ!* — la imitaĵo al la sono de batero.

\*\* Malgrandaj policaj oficistoj.

mezuriston laŭlonge la spino, kvazaŭ per malvarma raspilo.

— Klimĉjo! — ekkriis li. — Kolumbeto, kie vi estas, Klimĉjo?

Dum horoj ĉirkaŭ du kriadis la termezuristo, kaj sole post tio, kiam li raŭkiĝis kaj prenis al si la penson pri la noktpasigo en la arbaro, malforta venteto alportis al li ies ĝemon.

— Klim! ĉu tio ĉi vi estas, kolumbeto? Veturu ni!

— Vi mor . . . mortigos min!

— Sed mi ŝercis, kolumbeto! Punu min la Sinjoro, mi ŝercis! Kiajn revolvojn havas mi? Tion ĉi mi nur mensogis! Faru la komplezon, veturu ni! Mi frostiĝas.

Klim, kredeble, konsiderinte, ke vera rabisto jam longe malaperus kun la ĉevalo kaj

la veturilo, eliris el la arbaro kaj sendecide venis al sia vojaĝanto.

— Nu, kion, malsaĝulo, vi ektimis? Mi . . . mi ŝercis, kaj vi ektimis . . . Sidigu vin!

— Dio kun vi, sinjoro, — murmuris Klim, enmetanta sin en la veturilon. — Se mi estus sciinta, mi eĉ pro cent rubloj ne veturigus. Preskaŭ mortis mi pro la timo.

Klim ekvipis la ĉevaleton. La veturilo ektremis. Klim ekvipis ankoraŭ unufoje, kaj la veturilo ekkliniĝis . . . Post la kvara batero, kiam la veturilo ekmovis sin de la loko, la termezuristo kovris la oreloju per la kolumo kaj enreviĝis.

La vojo kaj Klim ne ŝajnis por li danĝeraj.

Tradukis el la lingvo rusa

S. Poljanskij.



## DIVERSAĴOJ.

### Adresaro de niaj abonantoj.

(Novaj aliĝoj.)

#### Aŭstrujo:

Fr-ino Ella Scheerpeltz, Wall. Meseritsch (Moravujo).

Fr. Vrána, kapelmajstro, Jablonetz a. Jiz., (Bohemujo).

Fr. Dittrich, str. Rudolfo 103, Kroměříž (Morav.)  
Otakar Forchheim, studento de la VII. kl.,  
Slaný (Schlan), Bohemujo.

Erwein Schenek, Fürstenstrasse, Mödling bei  
Wien (Malsupra Aŭstrujo).

#### Belgujo:

Lucien Blanjean, — 17, rue de Wautier, —  
Laeken — Bruxelles.

#### Brazilujo:

Dr. João Antonio de Avellar, Sete-Lagoas  
(Minas Geraes).

#### Finlando:

Magnus Nordensvan, Kuopio.  
S-rino Maria Petrovna Tretjakova, Michajlovskaja  
ul. N° 22, — Helsingfors.

#### Francujo:

Charles Méray, profesoro de l' universitato,  
Dijon.

Paul Tourette, prof., 6, Champ-de-Mars, Dra-  
guignan (Var).

Docteur Boyadjian, Samoens (Haute-Savoie).  
Marcel Laignier, 59, rue Libergier, Reims  
(Marne).

Paul Fruictier, 27, boulevard Arago, Paris.

#### Hispanujo:

Norman Maclean, Aguilas (prov. de Murcie).

#### Hungarujo:

Josefo Miletz, poŝt oficisto, Budapest, IX., Dan-  
dár-u. 26. I. 12.



**Rusujo :**

- Vsevolod Ivanoviĉ Lojko, domo de Kusman, Zakarjevskaja ul., Minsk.  
 Joann Brailovskij, selo Bobrovo, Lebedin, Kharkovskoj gub.  
 Vitold Tenisov, Stretensk (Sibiro).  
 V. Petrovskij, inĝeniero, Vladivostok.  
 A. Prager, Gruzinskij Val. d. Denisova, Moskva.  
 Salomon Mirinhof, Toropez, Pskovskoj gub.  
 A. I. Kuĉerov, uĉenik VI. kl. Realnago Uĉi-  
 liŝĉa, St. Urjupinskaja, Donskoj obl.  
 V. T. Evdokimov, St. Ĉusovaja, Permskoj  
 jel. dor.  
 Stirlin, Upravlenie Gosudarstvennih Imuŝĉestv,  
 Khabarovsk.  
 Leonard Leonardoviĉ Jakubovskij, Poĉtamt,  
 kv. N<sup>o</sup> 7, Moskva.  
 K. Ŝevjakov, starŝij uĉitel, vtoroklassnoj ŝkoli,  
 St. Pestravka, Samarskoj gub.  
 N. P. Levitskij, kolonelo, Voronej, Sadovaja 12.  
 Dr. Aleksandro Markoviĉ Spindler, St. Goto-  
 putovo, Tobolskoj gub. Selo Vikulovo.  
 La Publika Biblioteko en Poltava.  
 S-rino A. L. Lehnitzkaja, Poltava, Aleksandr.  
 str., fotogr. metejo.  
 G. T. Kuzmin, Rjazanj, butyrki dom Sokolova.  
 Tenisson, Narva, Joakimstal N<sup>o</sup> 80.  
 A. V. Sokolov, poĉt. tel. ĉinovnik, Centralnij  
 Telegraf, — Riga.  
 Vladimir Ŝmurlo, inĝeniero, Tomsk.  
 M. Sazanov, Ŝostka (gubern. Cernigov.)  
 Fraŭlino A. v. Schulzenheim, adr.: s-rino M.  
 I. von Mikwic, Molokanskaja ulica, dom  
 Inanova, — Baku.  
 Aleksandr Sjemjonov, St. Zemetĉino, Tam-  
 bovskoj gub.  
 Jakov Tschaga, der. Karpovka, per Tuapse,  
 Ĉernomorskoj gub.

**Svedujo :**

- Fraŭlino Anna Wager, Strand-Sundsvall.  
 K. G. Klaesson, Arvidsjaur.  
 Harald Carlsson, Stockholms-Elektricitetsverk.  
 Stockholm.  
 10 abonantoj Södertelgaj per s-ro Süsmuth.

**POŝTA KESTO.**

**Demando.** — Kial la societo »Espero« ne plenu-  
 mas sian devon kaj anoncas la kalkulan raporton de  
 la »Kapitalo de D-ro Zamenhof«, kiel postulas la § 6

de la regularo? Nun pasis jam la tempo da du jaroj,  
 kaj ne kun unu silabo ĝi tuŝis la aferon de la supre-  
 nomita fondajo?

*Scirola.*

Pri tiu ĉi demando ni ne povas doni nun la be-  
 zonan respondon, sed ni pensas, ke la societo »Espero«  
 mem baldaŭ respondos.

*La Redakcio.*

— **Malfacilaŭdemeco.** Riĉa Sinjorino,  
 kiu estis kuracita per la Artaj Oreltamburoj  
 de D-ro Nicholson, donacis al la Instituto la  
 sumon da **Kr. 25,000**, por ke surdaj aŭ mal-  
 facilaŭdemaj personoj, kiuj ne havas la rime-  
 dojn akiri tiajn, ricevu ilin senpage. — Le-  
 terojn oni volu adresi al: *Instituto Nicholson,*  
*»Longcott«, Gunnersbury, London, W.*

**Rebusoj.**

— De □ —

I.


```

      a
      o
      o
      o
      o
b o o o o o o o o o o o c o o o d
      o
      o
      o
      o

```

Jen estas 21 moneroj, kiuj estas 15 kaj  
 en la direkto *bed*, kaj en *bca*, kaj en *bce*.  
 Forprenu el ili 2 monerojn kaj aranĝu la res-  
 tantajn tiel, ke ili estu denove 15 en tiuj  
 samaj direktoj.

II.



Patro volas di-  
 vidi sian fruktoĝar-  
 denon inter 4 filoj.  
 La ĝardeno havas  
 tian formon, kian  
 la apuda figuro. La  
 filoj devas dividi  
 inter si la ĝardenon  
 tiamaniere, ke ĉiu  
 filo ricevu parton  
 egalgrandan kaj ĉiu  
 parto havu tian formon, kian la originala ĝar-  
 deno. Dividu ĝin laŭ tiuj ĉi kondiĉoj.

## III.

— De S. Poljanskij. —

Aligante antaŭ o po unu literon anstataŭ la ciferoj, oni ricevu :

o	
1 o	nomon de litero,
2 1 o	nomon de ludilo,
3 2 1 o	fizikan ideon,
4 3 2 1 o	aron.

— De Paul de Lengyel. —

## IV.

Mi estas frukto subtera; kaj, se vi min personigas: mi fariĝas arbo.

## V.

Mi estas veturilo, mi do ne estas senta; sed mi tuj fariĝas besto, se mi sentiĝas.

La solvojn de tiuj ĉi rebusoj ni presos en la n-ro 7. Ni petas tiujn inter la legantoj, kiuj sin interesas pri tio, ke ili alsendu la solvojn al la administracio de nia gazeto. La nomojn de la solvintoj ni presos kune kun la solvoj mem.

Oni povas ankoraŭ ensendi la solvojn de l' rebusoj trovataj en la n-ro 1. — ~~Ties solvojn~~ ni presos en la n-ro 6.



## HUMORAĴO.

Lingvo facile komprenebla.

*La amikino*: Kiel la franca grafo do povis svati vin kaj vi diri „jes“? li ne komprenas ja vian lingvon kaj vi ne la lian.

*La amerika heredintino*: Ho, estis tre simple. Li montris al mi sian tabelon geneologian, kaj mi al li montris mian banklibron.

La repaciĝo.

*La juna edzino*: Mia edzo kaj mi ĵus repaciĝis kaj kiel rememoraĵo de la okazo plantis arbon.

*La maljuna edzino al sia edzo*: Pensu ke ni tiel same estus farintaj. Kian grandan, belegan arbaron ni nun havus!

P. Ahlberg.

—o—

Filozofio ebriemula.

Diras ebriemulo:

— Nia korpo devas esti kutimita je la kontraŭaĵoj. Kiam ĝi deziras ricevi akvon, ni donu al ĝi vinon.

— Kaj se okaze ĝi deziras ricevi vinon? demandas iu.

— Nu! certe ni devas ja kelkfoje plenumi al ĝi ĝian deziron!

Vortludoj.

— Kia estas la donaco, kiun eble pleje dankos unu ĉevalo?

— Nature unu *aventuro*...

— Ĉu vi konas la eb'lecon de la kunligo de l' muso kaj de l' kato?

— Tute ne.

— Ĝi estas unu frukto...

— Kiel! unu frukto?

— Jes, la *muskato*...

A. Caetano Coutinho.

—o—

LA KARAKTERO.

— Vidu, tie iras Jakobo. Li estas homo malkonstantema; tiel ofte li ŝanĝas siajn principojn, kiel ĉemizojn.

— Nu, konklude li havas Spartanan karakteron.

KLERULO.

— En la pasinta nokto mi sonĝis, ke vi repagis al mi la dek rublojn, kiujn mi pruntedonis al vi.

— Mi estas konvinkita, ke vi, kiel klerulo, ne kredas en sonĝoj.

ARGUMENTO.

— Kial vi forsendis el la servo nian ĉambriston, kara edzino?

— Tial, ke ŝi estas tre purema, zorgema, obeema, ordema...

— ?

— Oni neniam povas insulti tian knabinon.

## LA KATASTROFO.

— Nu, sinjor' kuracisto, kiel fartas mia malsana bopatrino?

— Antaŭpretiĝu je katastrofo: ŝi baldaŭ resaniĝos.

## NE ĈIAM.

*La edzino* (al la edzo reenvenanta el la drinkejo): Ha, diboĉulo! vi estas ĉiam vinoplena!

*La edzo*: Se mi estus ĉiam vinoplena, mi neniam bezonus iri en drinkejon.

## EN RESTORACIO.

*La gasto*: Nu, mi povas diri, ke mi manĝis jam multe pli bonan bovidviandon ol tiun ĉi...

*La restoraciisto*: Tamen ne en mia restoracio?

## KIU MENSOGAS?

Arbaristo rakontas sian aventuron treege dubindan. Kiam li finis sian parolon, sinjoro diras:

— Kiel oni povas havi kuraĝon tiel grande mensogi?

— Kion vi diris? — krias kolere la arbaristo.

— Mi parolas pri unu mia amiko, kiu hieraŭ rakontis al mi la saman aventuron, kvazaŭ ĝi estus okazinta kun li.

—lp—

## ANONCOJ.

## ESPERANTISTO,

sciante bone praktike la lingvon Esperanto, kaj sperta en skribaj laboroj, serĉas ian oficon por labori speciale en Esperanto. Preta veturi en ĉiujn finojn de l' mondo por servi per Esperanto al Esperanto. — Adreso:

ODESSA (Rusujo), al A. Miropolski,

Mjeŝĉanskaja strato D. N° 7.

## L. I. 1899.

Sinjorojn esperantistojn, kiuj ĝis nun ne pagis la abonon kaj la anoncojn por la jaro 1899, mi tre petas sendi la monon al mi.

Hjalm. Bäckström,  
Örnsköldsvik (Svedujo).

Rim. Restantaj jarkolektoj de L. I. 1899 ne estas plu riceveblaj de mi.

## AMIKOJ-ESPERANTISTOJ!

Mi verkis en rusa lingvo kaj eldonis libron:

## „METODO POR INSTRUADO DE SKRIBOLEGO“

(Mjetod obuĉeniĝa gramotje).

Tiu ĉi libro, laŭ sia enhavo, estas tute nova kaj originala. Ĝi estas interesa ne sole por specialistoj, sed ankaŭ por ĉia pli-malpli inteligenta homo, ĉar, krom skribolego, ĝi koncernas multajn komunajn demandojn de edukado kaj popola instruado. Kiam tiu ĉi libro estos disvendita, *mi donos por la celoj de nia komuna afero 10% de l' profito*, kiun alportos al mi mia eldonaĵo. Tial, mi petas vin, amikoj-esperantistoj, subtenu, laŭ eblo, mian entreprenon. La libro kostas 50 kopekojn kaj estas ricevebla laŭ sekvanta adreso: S. Peterburg, Nikolskij pereulok, N 8/39, knijnjy magazin tovariŝestva

»Obŝĉestvjennaja Polza«.

*M. S. Rakitski.*

## LA NOMARO

de ĉiuj nun riceveblaj verkoj de la literaturo Esperanta sin trovas en la broŝuro N° 140 (Adresaro, serio XXI); oni povas ricevi tiun ĉi broŝuron ĉe

**D-ro L. Zamenhof**

(Varsovio, str. Dzika N° 9) sendinte ĝian koston aŭ per mono (45 centimoj kun transsendo) aŭ per signoj de poŝto de kia ajn lando (60 centimoj).

Plenaj jarkolektoj de la Lingvo Internacia (1900) estas riceveblaj ĉe mi

je duonprezo.

Kosto: 2 skand. kron. = 2.75  
hung. kron. = 2.88 frankoj =  
1 rublo = 2.25 ĝerm. markoj.

Paul de Lengyel  
administr. de la Lingvo Internacia  
en Szegzárd.

## Esperantistoj!

Disvastigante la konadon pri Esperanto oni akcelas la tutan aferon Esperantan. Unu maniero estas uzi ĉiam propagandajn kovertojn. Tiaj en sveda lingvo estas riceveblaj en Svedujo ĉe la Klubo Esperantista Upsala, en Finnlando ĉe s-ro Aug. Th. Laurén en Jyväskylä, kaj kostas nur

kr. 1.— (Fmk. 1:40 p.)

po 100, — al kio sin almetas la poŝtopago.

Ĉe la Klubo Esperantista en Upsala estas aĉeteblaj:

Jarlibro Esperantista 1897, eldonita de la Societo *Espero* en S. Peterburgo. Kostas 1 frankon.

Libro de l' Humorajo, de Paul de Lengyel. Tre rekomendinda verko, precipe uzebla kiel ekzerca lego de komencantoj. Kosto 3 frankoj.

## MI KOLEKTAS

uzitajn eksterlandajn poŝtmarkojn. Mi do petas la amikojn Esperantajn, ili volu sendi tiajn al mi. Mi estas preta je reservo, oni nur skribu, kiamaniere mi povas fari tion ĉi.

Josefo Miletz

poŝtoficisto,

Budapest, IX., Dandár-u. 26. I. 12.

Hungarujo.

## ✎ ESPERANTISTOJ, ✎

precipe svedaj, kiuj vojaĝos al Södertelge dum la sezono bana, estas petataj sciigi min pri tio ĉi. (Adreso: Södertelge, Ragnhildsgåtan 14.) Kiam ajn oni vizitas Södertelgon, oni volu fari viziton ĉe mi; informojn pri ĉio mi donas al kiu ajn.

J. J. Süssmuth.

## Finlandaj esperantistoj,

kiuj intencas akiri amatorajn fotografajn aparatojn, estas petataj observi, ke tiaj, kune kun necesaj hemiaĵoj kaj uziloj, estas akireblaj ĉe ni je moderaĵoj, krom kio al esperantistoj estas permesata rabato da 5%.

Postulu kostotabelojn!

Jyväskylä Rohdoskauppa  
en Jyväskylä.